FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA
H E F

BOLETIN

Núm. 2

Ruzafa, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

TRES PIES AL GATO

El movimiento Esperantista, que renace en España a la vida legal y oficial tras un largo período de marasmo y confusión, debe luchar, y debemos franca y lealmente reconocerlo, contra un mar de prejuicios y recelos, que sería contraproducente silenciar o disimular.

Digámoslo clara y fuertemente: El Esperanto es una lengua auxiliar internacional, cuyo inventor ideó con el laudable fin de crear un nuevo y eficaz instrumento de paz. No está adscrito a ningún credo político ni a escuela filosófica alguna. Sus filas están abiertas a todos aquellos que, sin distinción de nacionalidad, raza o credo político, desean, por medio de la lengua auxiliar, relacionarse entre sí, sin tener que sufrir el martirio del aprendizaje, casi siempre infructuoso, de lenguas extranjeras, en detrimento de la propia, que por tal motivo se descuida. Esto no quita para que unos la utilicen para sus relaciones filatélicas, fines turísticos y comerciales, o incluso que algún excéntrico busque, por medio del idioma auxiliar, a sus semejantes en Islandia o Singapur. En esto, allá cada uno con sus propósitos, más o menos laudables o más o menos ridículos, si así se quiere. Pero el Esperanto, en esto, no es ni más ni menos que algo así como la Imprenta, la Radio o el sistema Morse: un medio de expresión.

Pretender achacar al Esperanto, o al movimiento Esperantista, la culpa de todo lo malo o ridículo que por medio de esta lengua auxiliar se haya podido hacer en este mundo, silenciando su innegable utilidad general, sería tan disparatado e injusto como denigrar al castellano por todo lo malo o ridículo que se haya podido decir o hacer mediante la lengua de Cervantes. Y a nadie se le ocurriría maldecir de nuestra hermosa lengua castellana por los desaguisados que, por medio de ella pudieron cometerse, que seguramente han sido muchos...

Hablando concretamente del movimiento Esperantista en España, debemos puntualizar que, con el mayor respeto a los poderes constituídos, el acatamiento a las Autoridades y a sus disposiciones, su actividad es puramente lingüística. Todo lo que sea hablar de filiación o tendencías no es más que ignorancia, o lo que es peor, malevolencia.

Buscarle al Esperanto las cosquillas por ese lado, no es mas que lo que en buen castellano se llama... buscarle tres pies al gato.

LA parolo estas plej supera distingilo inter homo kaj besto. Tamen, en sia vasta hejmo de la mondo, la homo estas fremdulo inter homoj malsame parolantaj. Tial, nia lingvo, Esperanto, mirinda instrumento de la moderna tekniko kaj de la eterna poezio —kie do pli alta grado de perfekteco? — estas nun ege necesa por fandi la glacion de l' miskompreno per la varma fluo de sia forta impulso, de sia pura intenco, simpla sed grandioza, celanta nur rekte paroli de cerbo al cerbo, por trovi resonon de koro al koro...

Sekve, en nia epoko de konfuzo kaj angoro, Esperanto aperas kiel tre delikata specimeno de konkordo kaj ekzemplo de vera —plej vera— civilizo!

FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● En VALENCIA, los esfuerzos de los médicos esperantistas han logrado una favorable impresión en el Instituto Médico, y muy en breve será un hecho la constitución de la **Kuracista Esperanto Asocio**, así como el comienzo de un cursillo para médicos. No debemos silenciar la importancia de esas noticias, que significan un gran paso en la evolución de nuestro movimiento en España.

● En TARRASA, culta población en la que el Esperanto tiene tanto auge, tuvo lugar el 20 de Enero una simpática velada literaria para homenajear al incansable propagandista Sebastián Chaler, en su 65° aniversario, y, al propio tiempo, reunir a los tarrasenses miembros de la H. E. F.

El éxito de la **letervespero** fué muy comentado en dicha población y sirvió para dar mayor empuje a la progresión esperantista en Cataluña.

● En HUNGRIA, el Comité Central de Balnearios y Sanatorios ha editado un folleto en Esperanto para propagar dichos centros sanitarios.

La Feria Internacional de Budapest difundió sus noticias por medio de folletos en Esperanto. La importante ciudad Nagykörös puso a una de sus principales calles el nombre de «Esperanto».

● En SUIZA, «Der Naturfreund», la espléndida revista de la Asociación Suiza de Turismo, tiene una página en Esperanto, redactada por el samideano Kobelt.

● En ROMA, tuvo lugar el pasado 26 de Septiembre, el Segundo Día Esperantista Católico. S. S. el Papa, bendijo la organización y envió un saludo paternal.

El Ministro italiano de Instrucción y el alcalde de Roma enviaron también su saludo. El P. Caroffi celebró la Santa Misa en la cripta de la Basílica de San Antonio y predicó en Esperanto. El profesor Ruggiero habló sobre los puntos de contacto entre la caridad cristiana y el espíritu de fraternidad del esperantismo, así como de la utilidad del Esperanto para difundir aquélla.

Durante la velada, el profesor Crosetto propuso que se celebrase el Congreso Internacional de Esperantistas Católicos, en Roma, durante el año 1950; se nombró a tal efecto un Comité de organización. El profesor Musella, ciego, se dirigió especialmente a los maestros para demostrarles la utilidad del Esperanto para aprender otros idiomas. La reunión se terminó entonando el nuevo himno de los católicos esperantistas.

● En POLONIA tuvo lugar, el 1 de Noviembre pasado, el Congreso Polaco de Esperanto. Se puso en él de manifiesto el auge del movimiento esperantista en Polonia. Se leyeron interesantes comunicaciones de distintos profesores universitarios, entre ellos del Rector de la Universidad de Lodz, profesor Kotarbinsky, y del gran poeta polaco Julián Tuwim. Al terminar, los congresistas se dirigieron en masa ante las tumbas del Dr. ZAMENHOF y del protopoeta Antón GRABOWSKI, sobre las cuales se depositaron flores y se pronunciaron sentidos discursos.

● En el BRASIL, el partido Republicano, el más antiguo en el enorme país del Amazonas, ha aprobado la adopción del Esperanto como lengua auxiliar, de enseñanza obligatoria en las escuelas. Esta decisión, que se presentará oportunamente ante el Congreso, es de enorme importancia para nuestro idioma.

El Instituto Brasileño de Geografía y Estadística ha publicado un libro de 316 páginas en inglés, portugués y Esperanto.

● En DINAMARCA, la compañía de navegación aérea DDL, lo mismo que en Holanda la KLM, adopta también el Esperanto como idioma auxiliar. De momento ha editado un folleto en nuestra lengua, que ha sido profusamente repartido y que todo esperantista debe solicitar gratuitamente a: Del Danske Luftfartselskab A S, Reklameafdelingen, Store Kongensgade 29, KOBENHAVEN K. (Dinamarca).

Naturalmente, para solicitar dicho folleto escríbase en Esperanto.

● En ALEMANIA, país en el que el renacimiento esperantista tiene un presente esplendoroso y se augura un futuro triunfal, no pasa mes sin anotar nuevos y decisivos pasos en el camino del progreso. «La Semisto», órgano de los esperantistas católicos alemanes, se edita ya en su cuarto número y se reparte profusamente.

En Duisburg se reunieron, el pasado Octubre, los católicos esperantistas.

La radio de Münich emite con frecuencia en Esperanto.

El Ayuntamiento de Grosspösna ha decidido rotular una calle con el nombre del Dr. Zamenhof, después de oir una conferencia del samideano Walter Dietze acerca de la utilidad de nuestro idioma auxiliar.

● En NUEVA ZELANDA también se difunde rápidamente nuestra lengua; así lo atestigua el Sr. James Thorn, Jefe interino de la delegación de N. Z. en la O.N.U., que presidió la sesión semanal del Grupo Esperantista parisino. Después, se proyectó una película editada por el Gobierno de N. Z., el cual envía gratuitamente fotos de aquel bello país a todos los que escriban en Esperanto al Nov-Zelanda Registara Turisma Oficejo, P. O. Box 3037, WELLINGTON (Nueva Zelanda).

● En FRANCIA, las emisiones en Esperanto se han convertido en sección oficial para Radio-París. Tengan esto en cuenta los amigos radioyentes.

● En BULGARIA, la recientemente publicada «Enciclopedia Filatélica Búlgara», está redactada en seis idiomas: búlgaro, ruso, francés, alemán, inglés y Esperanto. ¡Un éxito más para los samideanos filatelistas.

● En todo el mundo cunde el deseo de tener un instrumento internacional de comprensión mutua. El Esperanto encuentra actualmente un ambiente propicio como nunca para su difusión. No podemos reseñar detalladamente todas las noticias que demuestran la importancia que nuestra lengua auxiliar va adquiriendo en todas partes. Líneas aéreas, compañías de navegación, congregaciones religiosas, partidos políticos, organizaciones estadísticas, filatélicos, todos adoptan cada vez más el Esperanto para sus necesidades.

BABILADETO

—Halo! mia kara, kia ĝojiga renkonto! Via farto, ĉu?

—Kontentige, dankon.

—Cu ankoraŭ esperantisto?

—Jes, kompreneble, kvankam iom malvarma. La movado stagnas.

—Efektive, ĝi ne tro rapide progresas, sed oni ne povas paroli pri stagno. Iom post iom nia afero antaŭeniras; ne mankas sukcesoj.

—Nu! Kion vi alnomas sukcesoj? Nova kurso kun 10 lernantoj? Kluba letervespero en Aĉurbet'? Ministra opinio favora al Esperanto? brrr...

Tamen estas ŝtupoj. Ni ne tro multe rapidu; ĉio venos siatempe.

—Kelkfoje mi dubas pri tio.

—Jes, ĉar vi ne partoprenas la kluban vivon. Certe en indiferenta medio plej granda entuziasmo malaperas. Kial vi ne ĉeestas de tempo al tempo?

—Nu, mi havas multege da laboro...

—Ne temas pri ĉiutaga afero. Cu vi ne iras filmoteatrojn?

—Jes, multfoje.

—Do vi havas tempon.

—Estas tute alia afero.

—Ne tute. Oni povas unu fojon en la semajno preterlasi la ceteron kaj ĝojigi la samideanojn per via ĉeesto. Cu vi jam scias, ke ni havas denove landan Asocion?

—Jes, mi ricevis cirkuleron...

—Do, vi aliĝis?

—Mi ne havis tempon!

—Post unu jaro? Nekredinde!

—Cetere, ĝi havas malmultajn membrojn. Estas tre modesta asocio.

—Kompreneble, ĉar multaj opinias aŭ agas kiel vi. Tamen ĝi ebligis, ke ni havas propran gazeteton.

—Tute malbonaspekta ĝi estas!

—Prave, sed oni plibonigos ĝin.

—Kiam?

—Guste tiam, kiam vi kaj viaj similuloj aliĝos, kiel subtenantoj!...

ELFO

INTER LA PROZO DE L

Per humila riverenco mi vin salutas denove, preta jam por rakonti iom el tio, kion pacience mi legis por vi, de post mia lasta babilado : La unua paĝo de HEROLDO sin garnas per arta portreto de D-ro Zamenhof kun respektoplenaj vortoj de la redakcio, okaze de la 89ª datreveno de lia naskiĝo. Mi ne povas ne ĉerpi la interesan komencon : «ĉiuj ideoj, kiuj estas ludontaj gravan rolon en la historio de la homaro, havas ĉiam tiun saman egalan sorton : kiam ili ekaperas, la samtempuloj renkontas ilin ne sole kun rimarkinde obstina malkonfido, sed eĉ kun ia neklarigebla malamikeco ; la pioniroj de tiuj-ĉi ideoj devas multe batali kaj multe suferi»... Ankaŭ en honora loko aperas portreto de Lidja Zamenhof, kies nobla kaj serena vizaĝo estas kortuŝa pravigo al apuda artikolo, kiu temas pri kelkaj privataj detaloj reflektantaj ŝian bonaniman karakteron, antaŭ ŝia tragika morto. Ankoraŭ densajn kolonojn da teksto plenigas la tikla problemo de daŭra kaj vera paco ; evidente, la mondo pravigas nun la hispanan proverbon, ke por kato brogita sufiĉas nur varmeta akvo... Estas grava, por seriozaj samideanoj, la raporto pri la reorganizo de la Lingvaj Institucioj, ĉar la sufiĉe granda amplekso de la Lingva Komitato, kiel duobla organizaĵo kun la Akademio, ofte montriĝis en la pasinteco malpraktika ; kaj el tio naskiĝis la ideo anstataŭigi la du komitatojn per unu sola, kun malpli granda nombro da membroj. Laŭ nova statuto, jam akceptita, oni lasas nur unu komitaton sub la nomo «Akademio de Esperanto», kun 40 membroj proksimume.

Sekvas en la vico ESPERANTO la simpatia revuo kaj organo de U.E.A. Sub ĝenerala titolo «Esperantismaj problemoj» aperas diversaj difinoj pri la interpreto de tiu diraĵo : LA FINA VENKO, kiel specimeno el la frazkolekto de nia propagando. Kio estas do, aŭ kion oni devas kompreni sub «Fina Venko» ? Por multaj fervoruloj, ĝi estas nur ĝenerala adopto aŭ enkonduko de Esperanto, vaste uzante ĝin en internaciaj rilatoj, ŝtataj kaj privataj. Tamen, laŭ la aŭtoro de tiu artikolo, la kompleta, la centprocenta fina venko estus ja la enkonduko de deviga instruado de nia lingvo en ĉiuj oficialaj lernejoj de ĉiuj nacioj. Sed, hodiaŭ, miloj da kursoj, aktive funkciantaj en publikaj lernejoj de diversaj landoj, ne proksimigis nin al tiu celo. Kritikemuloj en niaj vicoj argumentas, ke kulpas la metodoj de nia propagando kaj la manko de kunordigo en la klopodado. Plej grava kondiĉo estas la stabiligo de la situacio en Eŭropo ; dua, ne malpli grava kondiĉo estas la nepra akzisto de vasta uzantaro de Esperanto, la apero de bonaj libroj, la okazigo de plej imponaj esperantistaj manifestacioj. Tiam, ĉiu publika aŭtoritato ne povos preterlasi nek ignori la larĝan uzadon de Esperanto, kaj tio (nur tio) estas nia atuto, kiu vere certigos tion, kion ni ĉiuj deziras : la finan venkon !

Grava estas la freŝa sciigo, ke fondiĝis faka organizo kun la ekskluziva celo enkonduki Esperanton ĉe la Tutmonda Sindikata Federacio. Ankoraŭ estas menciinda sprita artikolo «La Batalo de la Lingvoj», kie oni studas kaj klarigas ne jam la batalon, sed vere ja la kverelon inter la lingvoj de la regantaj nacioj, kiuj sur la reduktitaj batalejoj de la diplomataj tabloj atakas kaj eĉ kontraŭatakas unu la alian per la batalilo de siaj propraj lingvoj. La aŭtoro faras koncizan historion : unue, en la moderna epoko, la franca lingvo heredis sian gvidan rolon de la latina ; dum jarcentoj la angla ne povis eĉ konkurenci kun ĝi, sed en la jaro 1919ª gajnis la angla egalan rajton ol la franca, kiu vole-nevole alkutimiĝis al tiu

ESPERANTISTA GAZETARO

ĝemela dulingveco, kiu estis paca ĝis antaŭ ne multa tempo, kiam aperis du timindaj rivaloj: la hispana kaj la rusa lingvoj! Logika konkludo estas: ke sola solvo venos, kiam fariĝos samtempe oficialaj, por internaciaj konferencoj, ĉiuj lingvoj de la mondo, aŭ kiam amike entrudiĝos, por meti pacon inter ĉiuj, unu sola same neŭtrala por ĉiuj, kiel bonvola peranto; kaj nepre ĝi estos nur nia kara kaj bela Esperanto! Ĝis tia tago, feliĉa ne nur por ni, sed por la tuta homaro, la esperantistaro daŭrigu la fosadon de sia sulko, montrante al la cetera mondo praktikajn agojn, kaj rigardante de tempo al tempo la kuriozan lingvobatalon, kiel la publiko de taŭroludo rigardas la spektaklon: komforte sidante malantaŭ la bariero!... Nia obstina portugala samideano Saldanha Carreira aperigas artikolon, kiun oni mendis al li, pri internaciaj lingvoj, por la Enciklopedio de tre grava eldonejo «Grande Enciclopedia Portuguesa e Brasileira». Mi ne povas rezisti la tenton preni kelkajn frazojn de lia artikolo garnita per hejmeca titolo: «Esperanto, popola lingvo». La aŭtoro asertas ke ĝi ests popola, ĉar ĝi ne postulas institutajn instruadojn, nek ambicias altajn katedrojn, sed la dorlotan apogon de la unuagradaj instruistoj. por ke ili, disvastigu ĝin inter tiuj, kiuj apartenas al la simpla popolo, kaj ne povas ĉeesti pli superajn studojn kaj per Esperanto posedos la necesan materialon por povi vivi internacie. Zamenhof vivis kun la popolo, li sentis la popolajn dolorojn kaj donacis sian verkon kaj koron al la popolo, kiu formas la plej grandan kaj modestan parton de la tuta homaro.

La beleta ESPERANTO FINNLANDO gaje bruas inter la ceteraj gazetoj per tre bone aranĝita eksterordinara novjara numero, kiu fiere kaj ĝoje pompas, kvazaŭ infano kun novaj ŝuoj, per freŝaj supersignitaj tipoj, kies matricojn jus ricevis la redakcio, kiel kristnaskan donacon, dank'al la zorgoj de sindona novjorka samideano. De Ĉeĥoslovakio venis monata, bele presita sur biblia papero, folio ESPERANTO-SERVO kun aktualaj kaj freŝaj informoj pri la tiea vivmaniero. Serioza (verŝajne tro serioza por kelkaj) tamen tre bonaspekta estas la bulgara monatulo INTERNACIA KULTURO. Facile legebla, eĉ por komencantoj, estas nia mezeŭropa kolego ESPERANTISTO SLOVAKA kun interesa artikolo por hispanoj pri la slovaka sakfajfilo, tiel simila al la galega muzikilo nomata «gaita», slovake nomita «gajda», t. e., preskaŭ same. AMERIKA ESPERANTISTO kaj FRANCA ESPERANTISTO estas eĉ lukse eldonitaj kun efikaj artikoloj en tiuj lingvoj mem, kiuj ĝuas hegemonian rolon, kaj kiuj fratece miksas siajn voĉojn en la ĥoron de la aktiva tutmonda esperantistaro.

LA PRAKTIKO daŭrigas sian malavaran prezentadon de belaj kaj aktualaj ilustraĵoj. Tute prave ĝi meritas la nomon Albumo de la Esperantistaro. SENNACIULO, kiel herezema filozofo, grumblas kaj grumblas tre obstine.

Mankas spaco jam por pli detala supervidado de la revuoj, sed estu dirite, ke ĝenerale la enhavo kaj aspekto de nia gazetaro videble pliboniĝas. Literaturaj fragmentoj abundas kaj agrabligas la legadon al tiuj precipe, kiuj en la esperantistaj rondoj ne ŝatas grimpi sur la gvidajn postenojn, kaj tial ili atentas sufiĉe flegme tro subtilajn rezonadojn; sed el ĉiuj vinberoj, se ili estas bonaj, fariĝas bona vino... Kvankam mi dubas, ĉu el tiom diversaj materialoj mi sukcesis aranĝi bongustan salaton por ĉies palatoj. Tio estis, almenaŭ, mia intenco; kaj tion solene asertas, kun la mano sur la brusto.

LA LEGEMA KOBOLDETO

INTER NI

La unua numero de la BULTENO, liverita senescepte al ĉiu de ni konata esperantisto —same ĉu li estis membro de HEF aŭ ne— vekis inter la hispana samideanaro grandan ĝojon kaj varman intereson. Gratuloj el ĉiuj partoj de la lando superŝutis nin dum la lasta monato, kaj tio montras kiel bone akceptata estis nia modesta organo, post kelkjara mortoŝajno de nia movado en Hispanio.

Tiuj gratuloj de la kara samideanaro estas sprono, kiu devigas nin ne laciĝi, akiri ĉiam novan forton kaj entuziasme daŭrigi nian laboron. La ekzemplo de nia neforgesinda Majstro, kaj la apogo de niaj federacianoj kaj abonantoj, igos nin persiste kaj obstine labori por Esperanto kaj nia kara HEF.

Tamen, ni solaj ne povas efektivigi niajn revojn kaj projektojn, se ĉiu HEF-ano ne kunhelpas fervore, varbante kiel eble plej grandan nombron da novaj membroj. Oni ne devas forgesi, ke la enspezo de la federacia kaso estas treege malgranda, tial ke ni klopodis, ke ĉiu samideano, eĉ la plej malriĉa, povu pagi sian kotizon kaj aparteni al la tutlanda organizo. La kotizoj al HEF estas, efektive, mirinde malaltaj; kaj ĝi nur povos prosperi kaj daŭrigi sian ekziston se la membraro atingas kvanton de almenaŭ 500 membroj, el kiuj minimume 300 apartenu al la kategorio de abonantoj.

La BULTENO estas sendata al multaj landaj asocioj kaj ĉiuj lokaj kluboj, kies adresojn ni konas. Multaj eksteraj esperantistoj legas ĝin; do, eventuale publikigotaj anoncetoj pri korespondado aŭ interŝanĝo, certe efikos. Mendojn pri tiaj anoncetoj ni plej plezure akceptos, ĉar ili estos bona helpo por malpligrandigi la nunan deficiton.

Sed eĉ tio ne ankoraŭ sufiĉas. Neniel ni povas esti kontentaj pri la nuna aspekto de la BULTENO. Ĝi estas tro modesta kaj ne povas impresi la neesperantistan publikon pri la graveco kaj seriozeco de nia afero; oni devas konfesi, ke ĝi, laŭ sia nuna stato, tute ne estas efika propagandilo. Tial ni celas pligrandigi iom la formaton, duobligi la nombron da paĝoj, enkonduki novajn rubrikojn, plibonigi la paperon, fari la enhavon ĉiam pli kaj pli interesa, k. t. p. Estas evidente, ke tio postulos novan pli grandan enspezon, kiun ni ne povos longe surporti, eĉ se la nuna membraro duobliĝas. Tial ni fiksis, kiel celataĵon por la nuna jaro, minimuman membraron de 500 samideanoj.

Tio ne montras la finon de niaj projektoj. Ni celas ankaŭ eldoni eĉ... librojn! gramatikon, vortaron kaj literaturaĵojn, ĉar ni nur disponas pri treege malgranda stoko da lernolibroj, kiuj baldaŭ elĉerpiĝos. Ne estas malproksima la momento, kiam persono deziranta studi nian lingvon ne povos aĉeti lernolibron; nun jam estas preskaŭ neeble akiri neuzitan vortaron. Ke tio starigas antaŭ ni teruran problemon, oni facile komprenos. Estas evidente, ke ni devas altiri al nia afero la neesperantistojn, sed kiel ili lernos la lingvon se libroj mankas?

Ni scias, ke tio estas plej malfacile solvebla problemo, sed ni ankaŭ scias, ke ĉies kunlaboro kapablos venki eĉ plej gravajn barojn. Nur ni konservu nian unuecon kaj nian fidelon al nia idealo kaj ĉio cetera venos, kiel natura sekvo de la bonega agado, kiun HEF esperas de sia entuziasma anaro. Nia estonto estas ĉe niaj manoj, do ek' al laboro! Nepre necesa estas via helpo!

ETULO

EL ESPERANTO: UN BELLO IDEAL DE MUTUA COMPRENSION

¡Me basta con el Francés y el Inglés!

Esto es lo que nos oímos constantemente al hablar del Esperanto a esas personas «prácticas», que juzgan pueril nuestro intento de dotar a la humanidad de una verdadera lengua auxiliar. También nos oímos con frecuencia esta otra: «¿Y eso, para qué sirve?»

Pues bien, he aquí una regocijante anécdota que contesta adecuadamente a esas dos salidas.

El conocido propagandista rumano Henriko Fischer refirió en el Congreso de Dresden el siguiente hecho, que sirvió para esperantizarle:

«Viajando de Bucarest a Constanza, vi en el vagón comedor que un viajero se esforzaba vanamente en explicar algo al camarero. Este usaba inútilmente sus conocimientos en rumano, ruso, servio, turco y búlgaro. Al no lograr comprensión, me adelanté protectoramente, y, alardeando de mi conocimiento en siete lenguas más, le hablé en alemán, francés, inglés, italiano, húngaro, griego, y hasta en español! En ninguna de esas doce lenguas logramos entendernos con el viajero.

Entonces, acordándome de un artículo recién leido en una revista acerca del Esperanto, le pregunté, haciendo uso de la única frase que podía decir en él: Cu vi parolas Esperanton?». Con un alarido de contento el viajero contestó en seguida: «Jes, mi parolas!» y siguió hablando sin interrupción, hasta que, gesticulando, le hice comprender que se me había concluído mi caudal de Esperanto. Quedóse perplejo el viajero, hasta que se le ocurrió sacar del bolsillo el librito clave Esperanto-Inglés, mediante el cual pudimos deshacer el nudo que impedía comprender al camarero.

Después de 10 horas, nos volvimos a ver sobre el puente del barco que nos llevaba a Constantinopla; yo me había asimilado ya el contenido del librito por lo que nos entendimos perfectamente. Pude entonces saber que nuestro esperantista era sueco, y que hablaba cuatro lenguas: sueca, noruega, danesa y finesa. Esto es, que entre los tres hablábamos dieciséis lenguas sin lograr entendernos, hasta que el Esperanto vino a solucionar en pocas horas el enredo. Por eso, y desde entonces, me hice esperantista».

(De *La Praktiko*).

Al leer esta jocosa anécdota, no se puede menos que sonreir conmiserativamente, pensando en aquella socorrida contestación: «Me basta con el inglés...».

APROBACION SUPREMA

Nos permitimos copiar de la revista esperantista alemana **Semisto** (Sembrador) por creerlas bastante interesantes, las palabras siguientes:

«A los esperantistas católicos, italianos y extranjeros, que han acudido a la segunda jornada esperantista romana, el augusto Pontífice agradece la manifestación de homenaje y les augura el feliz cumplimiento de los votos comunes, enviándoles cordialmente su Apostólica bendición».

Montini, secretario suplente.

CHARLA

—Hola! ¿Qué tal va eso del Esperanto?

—Bien, hombre. ¿Te interesas por ello?

—¿Quién? ¿Yo? No, hombre, no; y no es que yo no encuentre bien que todos pudiéramos entendernos, pero soy muy escéptico en ese punto. Además, si eso fuese una solución, ya lo habrían adoptado todas las naciones, y hasta en la O. N. U.

—A eso se va! Ahora que, eso de la adopción por las naciones... ¿Qué tal te parecería si ahora se tuviera que recurrir al antiguo sistema de pesas y medidas?

—Pues, chico, !se armaría cada cisco, hasta dentro de una misma nación! ¿Pero eso a qué viene?

—Pues viene a demostrarte que los gobiernos se preocupan muy poco de adoptar las cosas buenas si no dan una utilidad inmediata. En naciones como Inglaterra y los Estados Unidos, aún no han adoptado el sistema métrico decimal, lo cual es bastante cómico, a pesar de su reconocida superioridad sobre los usados aún en dichos países. Siempre quedarán remolones para la última hornada.

—¿Quieres decir que...?

—¡Que no seas de los últimos, hombre! Que puedan decir tus hijos con orgullo: «¡Mi padre, ya era esperantista en el año 49!».

—¿Y dices que os reunís de vez en cuando en...?

—¡Nada de vez en cuando! Todos los días laborables, de tres y media a cuatro y media, en la Horchatería Chaume. Serás muy bien acogido y te aseguro que lo pasarás muy bien. Se habla en Esperanto y del Esperanto, de arte, cultura, viajes, se exhibe la correspondencia recibida de esperantistas de todo el mundo, lo cual es de un atractivo enorme. Lo único que no se admiten son chismes ni discusiones que lleven a terreno de discordia.

—!Pues, sí, señor, que iré! !Y me pondré una estrellita verde como la tuya!

—!Alto! Eso, cuando sepas hablar en Esperanto. ¡Y tanto ella como ello te honrarán muchisimo!

LA MOVADO EN REUS

Semajna revuo «Lerida» aperigas sciigon pri kurso de Esperanto komencita entuziasme ĉe «Centro de Lectura».

Bondezirojn kaj sukceson!

ANONCETOJ

Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatos al nia afero. Unu peseto au unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto.

La mejor manera de favorecer al Esperanto en España es inscribiéndose en HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Socio de número ...	12 ptas,	anuales
Socio abonado.. ...	25	»	»
Socio protector... ...	50	»	»

Las dos últimas categorías dan derecho a la recepción de nuestro «Boletín».

CU VI JAM PAGIS VIAN KOTIZON?

Pri administrado kaj redakciaj aferoj de nia BULTENO, adresu ĉion al: HISPANA ESPERANTO FEDERACIO Ruzafa, 7 — VALENCIA (Hispanio).

Lasthore ni ricevas la doloran sciigon, ke nia mondkonata samideano, pioniro kaj enkondukinto de Esperanto en Hispanio, kolonelo VICENTE INGLADA ORS, forlasis nin por eterne. En la venonta numero ni aperigos pli detalan nekrolokon, kiel ateston de nia bona memoro al lia meritoplena persono.